Babilante dum la irado

Ĝen interesaj
eksplikoj faritaj de

CODORNÍU

dum vi vizitas
ĝiajn instalaĵojn

NI ESTAS RAVITAJ HAVI VIN KUN NI, AMIKO NIN VIZITANTA

Vi estas tre afabla, ke vi venis vidi nin.

Plaĉas al ni via akompano; nin dorlotas via interesiĝo pri niaj Vinkeloj.

Ni ekreciprokos vin. Ni montros al vi niajn trezorojn: la malnovan pasintaĵon kaj la feliĉan aktualaĵon de CODORNIU, pri kiuj ni estas tiel fieraj.

Ĉu vi bonvolas nin sekvi? Ĉi tiu broŝureto vin daŭre informos pri ĉio, kion vi vidos.

VIDU NIAN JARCENTAN KVERKON

Iun tagon, antaŭ jarcentoj, oni ĝin plantis en ĉi tiu bieno. Ĉi tiuj arboj longe vivas —vi tion jam scias— kaj vi ne trovos strange, ke ĝi ankoraŭ plu vivas. Tio, kio tamen surprizas estas, ke ĝi estis plantata kvazaŭ oni antaŭsentus la kontinuecon disvolvotan de generacioj, kiuj prizorgadis ĝis nun ĉi tiun bienon antaŭ la muta ĉeesto de la maljuna arbo.

Vidu ĝin: ĉi tiu kverko estas kvazaŭa atesto de volo.

Forta kaj grandega tra la tempo. Ion havas ĉi tiu Firmao el la Spirito de la kverko.

Ĉio komenciĝis antaŭ pli ol kvarcent jaroj: en 1551...Sed ni jam parolos pri tio. Nun ni nur diras al vi, ke ekde 1872, la fruktojn de la vitejoj de CODORNIU oni destinas ekskluzive por la ellaborado de ŝaŭmaj kelo-vinoj. Alidire: ke la instalajoj, kiujn vi vidos —serena loko ĉi tiu, ĉe la rivero Noya!— havastiun unikan celon, la kultivadon de vinoj laŭ la klasika metodo ĉampana.

Ni vin akompanas. Vidu ĉi tie...

PER ĈI TIUJ VINO-PREMILOJ KOMENCIĜAS LA MIRAKLO

Kanzonoj en septembro. Estas multaj ĉapeloj sub la suno. La vinber-rikoltistoj plezure tranĉas la grapolojn plenajn de uvo. Ili selektas kaj rifuzas eĉ la berojn ne sufiĉe maturajn. Nur tiuj plej bonaspektaj kaj delikataj meritos esti utiligataj por la ellaborado de la vinoj de tiu Firmao.

Kaj jen tie fleksiĝas la korboj el vimenaj vergoj, plenigitaj kun granda zorgo. Ili eniras tra tiu ĉambrego, survoje al la hidraŭlikaj premiloj fabrikitaj laŭ modelo patentita de CODORNIU —ĉe speciala entrepreno, ĝustas maŝinaro speciala—.

La premiloj laboras sen interrompo por atingi la tinan fermentaĵon, mosto-floron, kiun oni rekte kondukas al la transverŝaj bareloj en la Vinkelo.

Nun ni iros al ĝi. Sed, antaŭe, jen malgranda elvoko.

LA DINASTIO CODORNIU

Jarcenton XVI[an] . Brilegas la armeo, la beletroj kaj la artoj en Hispanujo. Duono de la mondo apartenas al ĝi. La alia duono ĝin admiras.

En ĉi tiu malgranda regiono kataluna, la sperta komercisto de vinoj, s-ro Jakobo Codorniu, havas jam en 1551 famon de vitkulturisto eminenta.

La familio Codorniu parenciĝas en 1659 kun la familio Raventós, kiu ankaŭ havis distinguindajn agrokulturajn antecedentojn.

Kaj en 1872, s-ro Jozefo Raventós Fatjó, antaŭvidante la grandajn eblecojn konverti en ĉampanon la vinojn de sia bieno, kaj post penigaj provoj, li sukcesas produkti la unuan botelon da ŝauma vino. Tiujare naskiĝis la unua ŝaŭma vino hispana.

Dek tri jarojn poste, en 1885, aperas la impulsa genio de Codorniu, s-ro Manuelo Raventós Domènech. Estas bone, ke la vinoj de Codorniu atingis sian eksterordinaran kvaliton. Sed nun oni devas doni al ili la eksterordinaran lokon, kiun tiuj vinoj meritas en la avangardo de la merkato. Kaj, certe, li tion atingas. La famo de Codorniu konkeras la nacian merkaton kaj disvantiĝas ekster la landlimoj, danke la intervenon de tiu viro.

LIA REĜA MOŜTO VENIS NIN VIDI

S-ro Manuelo Raventós Domènech estis liverinta servon al Hispanujo, donante prestiĝon kaj dignon al la vitokulturo. Kvazaŭ oficiale rekonante ĉi tiujn meritojn, Lia Reĝa Moŝto Alfonso la XIII[an] volis honori en 1904 la firmaon Codorniu, vizitante ĝiajn tiam jam famajn instalaĵojn.

Lia Reĝa Moŝto, la ĉefaj altranguloj kaj Ministroj de la Kortego, same kiel la reprezentantoj de la agraj korporacioj de la regiono, estis regalataj per tagmanĝo. Je ĝia finiĝo la Monarko sendis al sia Nobela Patrino —pere de mesaĝa kolombo— la telegramon, kies tekston skulpitan sur marmoro vi vidas ĉi tie. Tiel oni eternigas la memoron de tiu eksterordinara evento okazinta en nia Firmao.

Nu, ni daŭrigu nun. Vidu jam...

LA VINKELOJ

Jen pli da lignaĵo. Nun estas en la ligno de tiu senfina kvanto da etaj kaj grandaj bareloj, kie la vino estas zorgata kun speciala delikateco.

Ĉu vi memoras pri la mosto ĵus elfluinta el la premiloj? Do ĝi estas en ĉi tiuj bareletoj, kie ĝi ellaboriĝas.

Poste sekvas la klarigado de tiu vino. Kaj la transverŝoj de unu ujo en alian. Kaj la vinmiksadoj... Cio ĉi ne estas tasko por nekompetentaj manoj.

Tekniko, specialiĝo kaj delikateco: jen estas la personaj kvalitoj de tiuj, kiuj traktas niajn vinojn unuarangajn.

Nur tiel oni povas daŭre atingi —iom postiom: ĉi tie ĉio marŝas iom post iom— tiun diafanan travideblaĵon, tiun subtilan aromon, tiun plezurigan bukedon.

Cu ni daŭrigu antaŭen?



ĈI TIO NOMIĜAS "TIRADO"

La bareletoj estas gravaj. Sed kio decidigas estas la botelo. La transformiĝo, vere eksterordinara, okazas en ĝia interno.

Ĉiujare, en printempo, selektinte la vinon de la antaŭa rikolto, oni ĝin miksas kun aliaj vinoj maljunaj... kaj ĝin oni enboteligas.

Ni jam havas milionojn da boteloj cirkulantaj tra ĉi tiu sekcio. Plenigado rapida, ritmo tremanta, mekanikigo... Kiu diris, ke ĉi tie ĉio marŝadis malrapide?

Kaj poste... silento. Kun provizora korko, kiun je la fino de la procezo de ellaborigo oni devos ŝanĝi, la botelo jam enhavas la vinon, ce kies internaĵo lante ekformiĝas ĝia ŝaŭmo.

Kaj nun ni revenas al la malrapideco.

DESCENDU ĜIS LA VINKELOJ SUBTERAJ

La vino jam havas ŝaumon. Sed ĝi devas ripozadi plurajn jarojn en la kvieteco de ĉi tiuj senfinaj galerioj. Nur, de tempo al tempo, necesas "ŝanĝo de loko" por ke la formiĝanta sedimento ne adheru al la kristalo de la botelo. Ekspertoj tiufakaj kontroladas kun pacienco tiun ĉi lan tan procezon de oldiĝo.

Je tiu finiĝo, nepro elimini la sedimenton.



EN LA PUPITROJ DE LA VINKELO

Renversitaj boteloj kun korko malsupre, en la tiucela pupitro. La sedimento descendadas ĝis la korko.

Manoj kun bona pulso kaj lerteco speciala removas la botelon hodiaŭ. Kaj morgaŭ kaj poste... plurajn monotajn. Ĝis atingi, ke la sedimento estu tute koncentrita ĉe la kolo de la botelo.

Nun estas la momento.



LA MALKORKADO, LA UNUA ĜOJO

Atenton... La botelo, klinita. La specialigitaj metiistoj sin pretigas malkorki ĝin. For la korko! Eta kvanto da likvaĵo elŝprucas kun forto. La sedimento estis forpelata kaj la vino havas jam tiun oritan travideblaĵon, kiu poste brilos en la pokalo kun rapida ŝaŭmado.

Etan dozon da likvoro —dolĉan vinon malnovan— oni aldonas al ĉiu botelo por havigi al ĝi la guston dolĉan aŭ sekan en la respektivaj gradoj.

Nun, la definitivan korkon. Fiksan draton. Jam ĉio estas preta, sed ankoraŭ ne estas tempo...

Vidu dume Vinkelon altrangan.

LA VINKELO CODORNIU

Naskiĝis ĉi tie la unua ŝaŭma vino de Hispanujo. Estis ĉi tie, kie s-ro Jozefo Raventós Fatjó ellaboris en 1872 la unuajn botelojn de Codorniu. Ekde tiu momento decidiga, centojn de milionoj da boteloj oni daŭre ellaboras.

Estas ĉi tiu, reduto historia, kin prezidas la brusto de la glora antaŭulo. Apud li legeblas la nomoj de la proprietuloj de la bieno —Codorniu kaj Raventós— kiuj familioj ĝin administras jam de jarcentoj.

Kaj el kie devenas ĉio? De la fruktodona vito. Jen do ĝi, en la centro de la Vinkelo. Gi estas antikvega vito konvertita en artan lampon.

Premilo kaj kuvo, ambaŭ el la XV[a] jarcento, kompletigas la elvokan kolekton.

Ni revenu al la estanteco.

EKSPEDADO

Malmulte mankas jam al la botelo por ke ĝi estu preta por disvendo. Kelkaj monatoj da ripozo en la tri ampleksaj ĉambroj. Supermetitaj, kiujn ni vizitis, kontribuis al ĝia fina pretigo.

Nun jam ĉio estas ritmo kaj rapidemu alifoje. La tutan jaron funkcias rapide la sekcio de enpakado. La ornamadon de la boteloj oni devas fari mekanike, cele al pli granda rapideco. Ĉar estas multaj mendoj, kreskantaj ĉiumomente, kaj necesas ilin plene atenti.

Kaj ĉi tie finiĝas la longa periodo de ellaborado. Baldaŭ, ĉiu el ĉi tiuj boteloj okupos honoran lokon sur iu ajn manĝotablo de Hispanujo aŭ de eksteraj landoj, kunportante mesaĝon de ĝojo forĝitan en la silento.



VI JAM VIDIS NIAN FIRMAON

Ni dankas vian atenton.

Kiam vi foriros, ni sentos vian foreston. Sed ni scias, ke restados ĉe ni via amikeco, nun kiam ni nin konas pli bone.

Vi jam tion scias: ni restas por ĉiam amikaj al vi. Ĉi tie, en tiu serena loko ĉe la rivero Noya, ni restas laborantaj por vi; kun la amemo kaj zorgado, kiujn vi jam konstatis; kun la konfido ree renkontiĝi, en kiu ajn momento, ĉe kiu ajn manĝotablo: Vi, kun via pokalo preta; ni, kun nia botelo plenplena de la ŝaŭmo de la feliĉo.

IMPORTADORES DE CODORNIU EN TODO EL MUNDO

ALEMANIA R. F.: CODORNIU (Deutschland) G.m.b.H., **6800 Mannhein,** Walter Bothe Str. 12, Telefon (0621) 31 19 12, Telex 04-63329
Distribución/Kauf: Ramón Import G.m.b.H. und. Co. K. G. - Misma dirección/selbe Adresse

ALEMANIA R. D.: FORUM Handelsgesellschaft - **110-Berlín** - Schönholzerstr. 10-11

ANTILLAS FRANCESAS: ROBERT VILO, S.A. - B.P. 418 - **97204 Fort-de-France** (Martinique) Tel. 741419

ANTILLAS HOLANDESAS: J.A.J. SPROCK, N. V. - P. O. Box 163, Werfstraat 42, Tel. 12966, **Curaçao N. A.**
LICORES ARUBA N.V. - Lloyd G. Smith Blvd. 128 - P.O.B. 234 - **Oranjestad, Aruba N.A.** - Tel. 1094/3564

ARGENTINA: DELURO, S.A. - Humberto 1.º, 2162 - Casilla de Correos 4093 - Telex 122640 - Tel. 26-2096, **Buenos Aires**

AUSTRALIA: H. G. BROWN & SONS - 5 Gibbes Street - P. O. Box 130 - **Chatswood, N.S.W. 2067** - Tel. 407 1221

AUSTRIA: JOHANNES WEIHS Ges m.b.H. - **A-1060 Wien** - Hofmühlgasse 21/8 Tel. (0222) 563208

BAHAMAS: PREMIER IMPORTERS LIMITED - **Nassau** P. O. Box 1085 - Tel. 2-8396
COLONY WHOLESALE LIQUOR DISTRIBUTORS - P.O.B. 4831 - Tel. (809) 325-8753 - **Nassau**

BANGLA DESH: DACCA WARE HOUSE - Malek Mansion (5th Floor) 128 Motijheel C/A - **Dacca-2** - Tel. 242387

BARBADOS: STOKES & BYNOE LTD. - P.O. Box 401 - **Bridgetown, W.I.** - Tel. 61206 - 62211

BÉLGICA: VICTOR BERNAD E HIJOS, S.P.R.L. - 34 Zirkstraat/34 rue Zirk, **B-2000 Antwerpen/Anvers.** Tel. 329213 - Telex: 34040

BELIZE: SANTIAGO CASTILLO LTD. - P. O. Box 69, **Belize**

BENIN, República del: PAUL OKOUMASSOUN - B.P. 8021 - Tel. 31-3548 - **Cotonou**

BERMUDA: GOSLING BROTHERS LTD. - **Hamilton**

BOLIVIA: SEBASTIÁN Y CÍA. - **La Paz** - Socabaya, 375 Casilla n.º 393 - Tel. 55330

BURUNDI: COGIMEX - 3 Avenue du Commerce, **Bujumbura,** Tel. 3714

BRASIL: MARIO GOMEZ CARRERA - Rua Carneiro Leao 195/211 (Bras.) - Caixa Postal 8411 - Tel. 279-8132 - **Sao Paulo**

CAMERÚN: ETS. HISPANO-CAM - B.P. 5241 - 47, Ave. dur Dr. Jamot - Tel. 42-38-79 - Telex 5276 - **Douala**

CANADÁ: DE LA VIGNE - C.P. 275 - 135 Av. Brixton - **Saint Lambert** J4P 3N8, P. Q. - Tel. 671-4960
COSMOPOLITAN WINE AGENTS LTD. - **Toronto,** Ontario M5W 1B2 - P.O. Box 275, Terminal "A" - Tel. 5319946
IMPERIAL TRADING COMPANY LTD. - 13951 Bridgeport Road, **Richmond, B. C.** Tel. 273-7721 - Telex 04-355728
Mr. MAURICE J. LATOUR - 425 Manitou Road S.E. - **Calgary, Alberta** T2G-4C2

PARAGUAY: LA NUEVA AMERICANA - Mariscal Estigarribia, 111 - P.O. Box 882 - **Asunción** - Tel. 92021/25

PERÚ: JOSÉ LUIS REVILLA, S. A. - Av. España, 682 - **Lima** - Tel. 237688

POLONIA: AGROS - Zarawia 32-34 - P.O. Box P-41 - **Warszawa** - Tel. 216421
BALTONA - Pulaskiego 6 - **Gdynia** - Tel. 216036 - Telex 054-361

PUERTO RICO: SPANISH AMERICAN TRADING CO. INC. - P.O. Box 11728 Caparra Heights Station - **San Juan de Puerto Rico 00922** - Tel. 783-5366

RODHESIA: SABI SUPERMARKET & BOTTLE STORE (PVT) LTD. - P.O. Box MP2 - **Mount Pleasant** - Tel. 36021 - 36762

SALVADOR, EL: VECIANA HERMANOS Y CÍA. - Avda. Cuscatlan 302 - Apartado 06-393 - **San Salvador** - Tel. 22-2733

SENEGAL: SOANER - 111 Boul. Blaise Diagne - **Dakar**

SIERRA LEONE: W. F. CLARKE, S. L. - 68 Wilkinson Road - P.O. Box 18 - **Freetown** - Tel. 2395

SINGAPORE: HOCK TONG BEE - 347 Bukit Timah Road (3 1/4 mls.) - **Singapore 11** - Tel. 333674

SIRIA: JABACO - P.O. Box 1058 - **Aleppo** - Tel. 11026

SUDÁFRICA (República de): CIVIL SERVICE WINE & SPIRIT STORE (PTY) - Edura, Commissioner and West Streets - P.O. Box 2067 - **Johannesburg 2000** - Tel. 8386361

SUECIA: AB NORDMAN & CO. LTD. - Fack - **171 20 Solna** - Tel. 08/289080 - Telex 10047

SUIZA: SOLERA, S. A. - 70 Ave. de Châtelaine - 1211 **Châtelaine** - Tel. 022/965121

TAILANDIA: HAGEMEYER - HOLLAND - THAI COMPANY LTD. - 719 Honkong Bank Lane, New Road P.O. Box 46. **Bangkok.** Tel. 30994 - 30318

TAIWAN: THE TCHII ORGANIZATION - P.O. Box 68 **Taipei** - Tel. 3716346 - 3613653

TOGO: ELIAS BARSOUNA - 2, rue de l'Eglise - B 3153 - **Lomé** - Tel. 61-87

TRINIDAD Y TOBAGO: VICTOR E. MOUTTET - 18 Ag cromby St. - P.O. Box 646 - **Port-of-Spain** - T 34871 - 32646

U.S.A.: JOSEPH VICTORI WINES, INC. - 125 Sea Street, Brooklyn - **New York, N.Y. 11231** - Tel. 2 858-0600 - Telex 422380

VENEZUELA: H. L. BOULTON & CO., S. A. - Av. versidad 24, Esquina El Chorro - Apartado 9 **Caracas** - Tel. 457344 - Telex 22725

YUGOSLAVIA: EMONA - Kersnikova 2, **Ljubljana** 310-655

ZAIRE: SOCIETE GENERALE D'ALIMENTATION **shasa** - B. P. 15.898

Brut
GRAN
Codorníu
CODORNIU
NON·PLUS·ULTRA
BRUT
CODORNÍU
BENJAMIN
CODORNIU
EXTRA
CODORNÍU
CODORNIU
GREMAN
CODORNIU
ROSADO
CODORNÍU
BRUT

CAVAS CODORNÍU

San Sadurní de Noya (España)

GRAFICAS FLOS - BARCELONA

Depósito legal B. 7347 - 1962